
# NIA  PONTO


Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
Jesús Miguel García Iturrioz

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna(ĝis 30 jaroj): 20 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**JULIO/SEPTEMBRO 2020** **Nro. 124 (3/20)**



Bedaŭrinde ni devas dediĉi nian frontopaĝon al tiu eta estaĵo, kiu signis nian vivon kaj nian tutan agadon dum la lastaj monatoj. La koronaviruso iĝis la ĉefrolulo de tiu koŝmaro, kiu prokrastigis aŭ nuligis kongresojn, renkontiĝojn, kursojn, vojaĝojn, ktp. ene de Esperantujo.

Sed ni devas rigardi antaŭen. Kun la somerfino, ni forgesu pri pasintaĵoj kaj pretiĝu agadi en tio, kio estis ĝis nun niaj kutimaj priokupoj: unue, remalfermi nian Grupejon; poste, ekigi novan kurson, propagandi pri ĝi, plani partoprenon en kongresoj, okupiĝi pri burokrataĵoj, ktp. Ni eĉ devos ankoraŭ okazigi la laŭleĝan devigan ĉiujaran ĝeneralan kunvenon, kiun ne eblis celebri ĝustatempe. **Do, ek al la laboro!**

LOKE ...

## KRISTNASKA LOTERIO.




Tiun-ĉi strangan jaron 2020, eĉ nia tradicia kristnaska loterio iom prokrastiĝis.

La biletoj jam estas pretaj kaj ni komencos vendi ilin en la Grupejo la duan duonon de oktobro.

La ĉi-jara numero estas **40.259**. Ĉiu bileto kostas 5 €, el kiuj oni lotludas 4 € kaj restas 1 € kiel donaco al la Grupo.

Ĉiam ni bezonas vian helpon por la disvendado de la biletoj sed ĉijare, pro KOVIM, eĉ pli, ĉar eble multaj homoj ne kuraĝos viziti nian sidejon.

**Kaj memoru ke, kiel kutime, ankaŭ eblas aĉeti loterion per interreto**:

Por tio sekvu la jenajn paŝojn:

1. Enkontigu la monon en la konto de la Grupo Esperantista de Bilbao.
   IBAN-kodo: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**.
2. Sendu retmesaĝon al **esperantobi@gmail.com** informante pri la monenkontigo.
3. Ni sendos la skanitajn biletojn per retpoŝto. La originaloj restos en la E-Grupo de Bilbao.
4. Se la biletoj estus premiitaj, ni rekte sendus la monon al la bankkonto indikita de la aĉetinto, tute senpage por li aŭ ŝi.
5. Tiu, kiu volus ricevi la originalajn biletojn post la lotado, bv. sendi retmesaĝon al **esperantobi@gmail.com** kaj ni sendos ilin per normala poŝto al la adreso indikita de la aĉetinto.

**Como de costumbre, también se puede comprar la lotería de Navidad por internet.**


Para ello:




1. Hay que ingresar el dinero en la cuenta del Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**.
2. Hay que enviar un e-mail a **esperantobi@gmail.com** dando cuenta del ingreso.
3. Enviaremos los billetes, escaneados, por e-mail. Los originales quedarán depositados en el Grupo de Bilbao.
4. Si los billetes resultan premiados, enviaremos el dinero, directamente, a la cuenta indicada por el comprador, sin gasto alguno para éste.
5. Quien quiera recibir los billetes originales, una vez realizado el sorteo, debe enviar un e-mail a **esperantobi@gmail.com** y se los enviaremos, por correo ordinario, a la dirección que se nos indique.

**LOKE ...**

## Donaco por nia amiko Eduardo Larrouy.




Bruno Robineau, el Francio, sendis al ni la donacon, kiu aperas sur la apuda bildo. Temas pri biciklo farita de li mem pere de dratoj. Li faris ĝin por donaci al Eduardo okaze de lia 107-jariĝo. Eduardo mortis dume, sed Bruno sendis sendi la donacon al la E-Grupo.

Koran dankon. Ĝi restos kiel daŭra memoraĵo pri nia neforgesebla amiko Eduardo.

## Ni devis halti niajn kursojn.

De kiam la hispana registaro dekretis, la 14an de marto, la devigan enhejmiĝon de la loĝantaro pro koronavirusa malsano KOVIM-19, la vivo de ni ĉiuj ege ŝanĝiĝis ĉar, inter aliaj aferoj, la vojaĝeblecoj ege reduktiĝis.



Tial tute ne eblis daŭrigi la elementan kurson, kiu komenciĝis antaŭ nemulte, almenaŭ kun la persona ĉeesto de la gelernantoj.

Spite de tiuj malfacilaĵoj, la instruisto, David, ne ĉesis la kontakton kun tiuj estontaj esperantistoj kaj klopodas instrui ilin pere de la reto.

Ni esperu baldaŭ reiri la vojon al la antaŭa normala situacio.

## Kaj ni ankaŭ devis prokrasti nian ĝeneralan kunvenon.

Ni devis laŭleĝe okazigi ĝeneralan kunvenon por aprobi, interalie, la spezojn de la pasinta jaro kaj la buĝeton por la nuna. Ankaŭ oni devis renovigi la estraron. Pro koronaviruso kaj sekva malpermeso de grupiĝoj, ni ne povis kunvoki homojn.

Estariĝis la ideo okazigi virtualan kunvenon sed ni antaŭvidis multe da malfacilaĵoj, do finfine ni rezignis pri ĝi.

Ankoraŭ restas kelkaj monatoj ĝis la fino de la jaro kaj ni ne perdis la esperon iamaniere plenumi tiun devigan kunvenon.

## Kuriozaĵo.




Niaj amikoj el Zaragozo sendas tiun-ĉi kuriozan reklamon.

**H.E.F.**

## DUAFOJE  PROKRASTITA LA 79a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO.




La Loka Organiza Komitato de la Hispana Kongreso de Esperanto, kiu, kiel oni scias, estis okazonta en la urbo Comillas (Kantabrio), kaj kiu jam estis prokrastita al la monato oktobro, decidis, interkonsente kun la estraro de HEF, denove prokrasti la Kongreson al la venonta jaro. La decido estis malfacila, kaj, eĉ se la sanitara situacio notinde pliboniĝis, precipe en Kantabrio, ni konsideris pli prudente ke la ĉeesta renkonto estu okazigita en majo 2021, unu jaron post tio antaŭvidita.

Ni informos pli poste pri la detaloj de la evento. La personoj jam aliĝintaj povas kontakti la organizan teamon, por konservi sian rezervon aŭ por peti la repagon de la kotizoj.

Por oktobro konserviĝas tamen la kunvoko de Eksterordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio, kies planado estis aprobita en la kunveno okazinta en pasinta majo. La anoj ricevos la necesan skriban kunvokon, kaj ĉiukaze ni informos pri la detaloj en venontaj Bitbultenoj.

*(« La Bitbulteno » de HEF. Nro. 67. Jun. 2020)*

## Hispano kandidatos al prezidanteco de TEJO.



Baldaŭ okazos baloto por la estraro de TEJO, al kiu prezentiĝas interalie unu homo devenanta el Hispanio: Carlos Pesquera (pr. Karlos Peskera).

Dum tiuj ĉi tagoj kelkaj el la kandidatoj prezentis siajn proponojn en la paĝoj de Libera Folio: https://www.liberafolio.org/

*(HEF. 05/07/2020)*

## Naskiĝas H.A.F.E.

Post la okazigo en Malago de la Kongreso de la Internacia Fervojista Esperantista Federacio (IFEF), kelkaj hispanoj kiuj ŝatas la fervojan mondon, ĉu profesie, ĉu ŝat-okupe, decidis renkontiĝi ene de nova grupo sub la nomo “Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj”. IFEF ĵus akceptis tiun hispanan grupeton kiel novan nacian sekcion ene de la fervojista federacio.

Nia grupo jam disponas pri propra TTT-paĝo https://hafe-19.webself.net/, tie ni diskonigos fervojajn informojn en la internacia lingvo. Nia celo estas okazigi, de tempo al tempo, ekskursojn aŭ aliajn agadojn en esperanto rilate la fervojan mondon. Se vi ŝatas trajnojn, stacidomojn, trakojn....ktp, jen via nova grupeto.
Kontaktu kun: fervojista@esperanto.ac

*(Angel Arquillos. 10/06/2020)*

**H.E.F.**

## HEJS ORGANIZAS NOVAN « BENKONTIĜON ».

HEJS (Hispana Esperantista Junulara Sekcio) organizas novan renkontiĝon (unu el la de ili nomataj « benkontiĝoj »). Ĉi-jare ili renkontiĝos en Las Palmas de Gran Canaria (Kanariaj Insuloj), inter la 4a kaj la 8a de decembro 2020.




La loĝloko estos « Alcaravaneras Hostel » kaj la loĝado kostos 57 € por la 4 noktoj. Manĝoj estos organizataj kiel parto de la programo mem.




Pliaj informoj :
https://benkontigxo2020.wordpress.com/

Sur la maldekstra foto, la benkontiĝo 2019 en Santander.

## VIRTUALA CELEBRADO DE LA TAGO DE LA LIBRO.

En tiu ĉi jaro ne eblis partopreni la tradician legadon de la verko Don Quijote, sed tamen, laŭ iniciato de Hispana Esperanto-Federacio, eblis ĝui la Internacian Tagon de la Libro, en virtuala maniero. En la retejo de HEF troviĝas la plena versio en Esperanto de la majstra verko “La inĝenia hidalgo Don Quijote de La Mancha”, libere alirebla en formato epub. HEF kuraĝigis la legantojn kunhavigi sian sperton, filmante sin dum oni legas pecon de la verko. Eblas spekti la rezulton en la jutuba kanalo de HEF, kun dekduo da legadoj, en kvar filmoj, en la adreso: http://www.youtube.es/esesperanto.

*(« La Bitbulteno » de HEF. Nro. 67. Jun. 2020)*

## ESPERANTO KAJ FRAMASONARO.

La Centro por Studoj de Framasonismo CIEM nun enretigis la prelegon de José Antonio del Barrio, la prezidanto de HEF, organizita en februaro 2020 en la sidejo de la liberala framasonismo en Madrido, pri la rilato inter Esperanto kaj Framasonismo aŭ framasonoj.

Spektu ĝin ĉe: https://www.youtube.com/watch?v=GczJYucXP2k

*(« La Bitbulteno » de HEF. Nro. 67. Jun. 2020)*

## La pasinta lernojaro en la UNED (Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado).

En la lernojaro 2019-2020 aliĝis 28 studentoj, plus 1 kiu ekzameniĝis libere. En junio ekzameniĝis 8 kaj aprobis 6; en septembro verŝajne prezentiĝis nur 1 kaj li verŝajne aprobos

Jam malfermiĝis la enskribiĝo por la kurso ĉijara, kaj, kiel novaĵo, ĉijare oni malfermos la nivelon B1. Jen detaloj:
https://www.esperanto.es/hef/index.php/42-noticias-espanol/articulo/427-ampliada-la-oferta-de-cursos-de-esperanto-en-el-cuid-de-la-uned

*(T.B. 10/09/2020)*

**H.E.F.**

## PLIAJ KURSOJ EN LA UNIVERSITATO UNED, NUN ANKAŬ ĈE NIVELO B1.




Ĵus malfermiĝis la periodo por enskribiĝo en la kursoj proponitaj de la Centro pri Lingvoinstruado CUID de la Universitato por Neĉeesta Edukado de Hispanio UNED. Unu el la novaĵoj de tiu ĉi akademia lernojaro 2020-2021 estas la aldono de la nivelo B1 en la instruado de Esperanto. Ĉijare eblas do enskribiĝi denove en la baza kurso (per kiu oni atingas je la fino de la jaro la nivelon A2 laŭ la Eŭropa referenckadro por instruado de lingvoj), kaj ankaŭ unuafoje en la nivelo B1, al kiu povas aliri la homoj trapasintaj la nivelon A2 en antaŭaj okazoj kaj ankaŭ tiuj kiuj jam havas iujn konojn de Esperanto pro antaŭa lernado.

La kursoj de Esperanto disvolviĝas kun la apogo de Hispana Esperanto-Federacio, pere de kunlabora interkonsento kun la Universitato. Nia asocio zorgas pri la pretigado de kriterioj, ellaborado de materialo kaj selektado de la instruistoj. Pri la organizado zorgas la CUID, en kies retejo oni povas legi la detalojn kaj povas formaligi la enskribiĝon. La periodo finiĝas la 22an de oktobro.

*(Bitbulteno de HEF. Nro. 68. Sept. 2020)*

## Raporto pri la Bitbulteno de HEF.

Jen raporto pri la plej lasta Bitbulteno, kaze ke vi volas mezuri la efikon de nia agado:

Sendita al 1085 adresoj, ricevitaj 1074. Malfermis ĝin 291 adresoj, entute 569 fojojn (inkludas plurfojajn malfermojn kaj resendojn al aliaj homoj, inter ili pli ol 100 venas el la disvastigo kiun mi faris poste per retlistoj aŭ sociaj retoj). El tiuj adresoj malfermitaj, 128 klakis en ligilo, entute 534 klakojn.

Plej ofte malfermitaj ligiloj: informo pri UNED-kurso: 53 fojojn; adresoj de UNED: 34 (enskribiĝo) +34 +29.

*(José Antonio del Barrio. 23/09/2020)*

## Renovigo de la retejo de HEF.

Dum tiuj ĉi pasintaj monatoj ni renovigis parton de la enhavo de nia retejo, ĉefe de la hispanlingva parto, kun novaj artikoloj kaj sekcioj, Vidu ekzemple la menuon "El esperanto hoy", kun artikoloj pri kulturo kaj movado. Ni ankaŭ nun plibonigas teknike la Bitotekon de HEF. Dume memoru ke tie vi trovos je via dispono amason da kvalita materialo en kaj pri Esperanto. Vizitu ĝin ĉe: http://bitoteko.esperanto.es/.

*(Bitbulteno de HEF. Nro. 68. Sept. 2020)*

## Ĉu vi interesiĝas pri matematiko en Esperanto?

Jen interesa kanalo por matematikemuloj:

https://tubaro.aperu.net/k/ytb_UCVI_WkwNNQTblC-rjakMFkQ/

## TRA LA MONDO …

## Savu abelojn kaj kamparanojn.

Multaj insekto-specioj tutmonde malpliiĝadas pro diversaj kauzoj: Intensa kaj monokultura agrikulturo kaj ĝardena kultivado kiu uzas pesticidojn, uzado de la grundo por domoj kaj stratoj, trafiko kaj lumoj, kemiaĵoj en la ĉiutaga vivo, ktp.

Nuntempe EU debatas pri la agrikultura politiko de la sekvaj 7 jaroj; pro tio nun necesas instigi la parlamentanojn al ŝanĝoj.

Jen peto subteni ĉi-tiun ECI (Europa Civitana Iniciativo) por savi abelojn kaj aliajn insektojn kiuj fekundigas multajn plantojn au tiajn, kiujn ni ne vidas ĉar ili vivas en la humusa grundo, kaj samtempe ŝanĝi la manieron subteni la kamparanojn. Ni krome ne forgesu, ke multaj birdoj vivas de insektoj. Ĉi-tiu ECI postulas: „Savu abelojn kaj kamparanojn“:

1. Redukti la uzadon de sintezaj pesticidoj, komencante per la plej danĝeraj substancoj, kaj redukti la kvanton je 80% ĝis 2030; kun la celo entute ne plu uzi tiajn ĝis 2035.
2. Reaktivigi la ekosistemojn sur kampoj, por savi la biodiversecon.
3. reformi agrikulturon, doni prioritaton al malgrandaj bienoj kiuj kulturas tre diverse; subteni la neutralan edukadon de kultivistoj sendepende de industria influo, cele al organika agrikulturo sen sintezaj (t.n. sistemaj) pesticidoj kaj sen genteknike modifitaj plantoj.

ECI validas nur por civitanoj ene de EU, pro tio la subskribo estas iomete pli kompleta ol aliaj pet-subskriboj. Jen la ligo, kie vi povas elekti inter la jenaj lingvoj: de, en, es, fr, it: www.savebeesandfarmers.eu/eng/

*(AVE-Asocio de Verduloj Esperantistaj. 20/06/2020)*

## De dezerto returne al verda pejzaĝo.

Al Baydha - Saudi-Arabio. Instalo de Regajnebla Agrikulturo en dezertita tereno 50 km sude de Mekka – 8 jara laboro necesis por regajni la originalan pejzaĝon – savano. Tiu iĝis dezerto ĉar homoj ekde la 1950-aj jaroj forhakis la arbojn. Neal Spackman estis petita de 2 saudi-arabaj princinoj kaj subtenita de ili regajni la tipan savanan pejzaĝon.

Filmeto, dank al informoj de European Green Party (ĉiuj en la angla): www.youtube.com/watch?v=T39QHprz-x8

Jen la firmao kiu organizas tiajn projektojn: www.regenerativeresources.co/

Tie vi trovos pliajn filmetojn pri regajnebla agrikulturo; ekzemple,

www.youtube.com/watch?v=6vQW8Tl_KLc

Kaj jen similaj klopodoj de la israela KKL re-verdigi la Negev-Dezerton:

www.youtube.com/watch?v=jDjW8WvFcGQ

*(AVE-Asocio de Verduloj Esperantistaj. 20/06/2020)*

Ne forgesu ke ni havas TTT-ejon: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
Vizitu ĝin!!!
Kaj ke nia retadreso estas esperantobi@gmail.com

## TRA LA MONDO …

## UNESKO Eldonis unuan libron en Esperanto “De ideoj al agoj: 70 jarojn de UNESKO”.

Antaŭ UK 2017, Unesko, kunlabore kun UEA, publikigis *Unesko-Kurieron* en Esperanto. La lanĉo de la *Kuriero* reciproke proksimigis la rilatojn inter Unesko kaj UEA, interesigis esperantistojn pri Unesko kaj Uneskon pri Esperanto. Por evoluigi la Esperanto-uzadon ĉe Unesko mem, laŭ iniciato de Trezoro Huang Yinbao, UEA lanĉis en aprilo 2018 strategian planon por disvastigi la idealojn kaj la valorojn de Unesko per Esperanto. Aprile de 2019, Trezoro, la nuna dua vicprezidanto de UEA, raportante al Unesko, ke pli da esperantistoj, kiuj ne konas UN-lingvojn, esperas koni Unesko-n per Esperanto, proponis, ke Unesko eldonu “De ideoj al agoj: 70 jaroj de Unesko en Esperanto”.

Danke al la kunlaboro de afablaj kaj helpemaj Unesko-oficistoj kaj danke al esperantistoj el sep landoj, la paralela Esperanto-ĉina versio de la Unesko-libro estas oficiale eldonita de Unesko kun UEA julie, antaŭ la VK 2020. En tio partoprenis precipe la esperanta tradukisto kaj antaŭa vicredaktoro de *Unesko-Kuriero* en Esperanto, Andrej Peĉënkin, la iniciatinto kaj ĉefredaktoro Trezoro, vicredaktoro François Lo Jacomo, la reviziintoj (Rob Moerbeek, Michela Lipari kaj Wang Fang) kaj la ĉinlingva traduka kaj revizia teamo de Trezoro.

Tiu ĉi libro estas dediĉita al la sennombraj viroj kaj virinoj, kiuj tion realigis, tra la tuta mondo, asocie aŭ unuope, en Naciaj Komisionoj aŭ Unesko-Kluboj, ĉe la ĉefsidejo aŭ surloke. La libro prezentas rakontojn pri tio, kiel Unesko plenumis sian mision, reflektante la profundecon, amplekson kaj efikon de Unesko-agado, por certigi klerigadon por ĉiuj, konservi kaj krei konsciiĝon pri universala kultura kaj natura heredaĵo, por protekti la parolliberecon, plibonigi ĉiujn sciencojn por ĉies bono, lukti kontraŭ rasismo kaj por dialogo, toleremo kaj socia inkludo kaj por doni povon al knabinoj kaj virinoj en ĉiu socio.

Menciinde estas, ke Carlo Minnaja, komisiita de Esperanta PEN-Centro, zorge kaj tre atente kontrolis la tekston de la libro pli ol kvarfoje kaj donis bonegajn konsilojn. La eksa ĝenerala direktoro Irina Bokova skribis la antaŭparolon kaj Duncan Charters, Trezoro Huang Yinbao kaj François Lo Jacomo skribis la enkondukon.

(Gazetaraj komunikoj de UEA. Nro. 896. 31/07/2020)

## Forpasis Zlatko Tišljar.



Ĵus forpasis Zlatko Tišljar (1945-2020), jugoslavia, kroatia kaj slovenia instruisto, kulturgvidanto, verkisto, redaktoro kaj socia aktivulo, konata en Esperantujo kiel Pajo.
Legu pli en la nekrologo en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” https://sezonoj.ru/2020/09/nekrologo-50/

*(María Zocato. 08/09/2020)*

Zlatko aktive partoprenis en la EEU-kongreso okazinta en Bilbao en la jaro 2004. Li prelegis kaj postlasis agrablajn memoraĵojn ĉe ni. Li estis ankaŭ la redaktoro de “Eŭropa Bulteno”, la órgano de EEU.